

# Ĉu paralizitoj volas kaj povas havi la geedzan vivon?

## Enkonduko

Pri la deziro kaj kapableco de amo kaj amoro tute ne necesas diskuti ĉe la sanuloj, ĉar la afero por ili estas ĉiuokaze laŭvola. Sed por paralizitoj tio estas absolute alia stato. La paralizitoj en ĉio dependas de aliaj homoj - eĉ en amorado. Antaŭ ĉio, preskaŭ ĉiuj, inkluzive paralizitojn mem, ne kredas ke paralizitoj kapablas havi la geedzan vivon. Pri tiu ĉi problemo mi demandis al geamikoj



**Mao Zifu**

lastatempe per telefono kaj interreto. En ili troviĝas miaj intimaj geamikoj antaŭaj kaj nunaj, la nove konitaj, esperantistoj kaj neesperantistoj, junaj instruistoj ktp. Ili ĉiuj ĉuadis kiam mi intencis tuŝi la temon. Laŭ ili, babili pri amoro kun paralizito estas tabuo, kaj fakte ili scivolas, ĉu homoj kiel mi ankoraŭ havus la deziron, kapablas fari la aferon, kiel ni farus la aferon.

Tiuj duboj ofte obsedis ankaŭ mian amikinson kiu antaŭ pli ol 20 jaroj min amis kaj tiam mi amis ŝin. Pro mia paraliziĝo, ĝuste tiuj duboj igis ŝin disiĝi de mi, kaj kompreneble ŝiaj parencoj kaj geamikoj donis al ŝi sufiĉe da premoj. Nepovado kontaktiĝi inter ŝi kaj mi daŭris 20 jarojn. Kiam mi finfine sukcesis telefoni al ŝi por ‘prienketi’

ŝin, ŝi konfesis la dubojn kaj demandis al mi ĉu mi vere vivus kiel monaĥo. Aŭdinte mian klarigon, ŝi min vizitis kaj volis pruvi mian diron. Nesurprize, koncernaj specialistoj kaj ĵurnalistoj ankaŭ dubas pri la kapableco kaj sekvoj de la edziĝo de paralizitoj. Tiam aferon flankenmetas la ŝtata kaj lokaj ligoj de handikapuloj. Verŝajne la organizoj ĉefe nur zorgas pri la materia vivo de handikapuloj sed rezignacias aŭ preteratentas pri la mensa.

Nun mi volus dividi kun amikoj miajn spertojn en la du flankoj subjektivo kaj objektivo.

## 1. Racia forlaso

Unu jaron kaj duonon post la trafik-akcidento kiu paralizis min en la aĝo de 22 jaroj, mi eksidis en rulseĝo, reveninte al la lernejo el la resaniga hospitalo en la provinca ĉefurbo. Ĉe sunsubiro aŭ rego de sunlumo kaj zefiro, amikoj puŝis min el la ĉambreto kaj ni kune promenis aŭ sidis inter arboj aŭ sur herbejo. Parolante pri ĉio, mi ĝuis saŭdadon kun malfermita sino.

Iuvespere, sunradio kun brizo. Sur la sportejo okazis flugpilka matĉo inter instruistinoj. Intima amiko akompanis min sub arbegoj spektante la belan scenon longatempe for de mi. En mallongaj kostumoj ili aspektis viglaj cervoj. Junaj virinoj kaj fraŭlinoj. Kurado kaj saltado, tumulto el parolado kaj ridoj – kia spektaklo de tridimensia filmo! Post nelonge, fingre montrante unu virinon kiu estis lakte blanka, koketeta, pufvanga kaj plenbrusta, la amiko demandis al mi: “Ĉu vi havas reakcion tie, kiam vi rigardas ŝiajn trajtojn?” Tiujn vortojn aŭdinte, mi ne komprenis kion li celis, tial mi ĉuis kun dubo: “Kia reakcio?” Li duonridis sen respondi. Subkonscie li suprentiris sian duonpantalanon. Iom kunŝovinte la brovojn, mi finfine komprenis lian sugeston ĉar li kovris sian kacujon per siaj manoj. Por sincere diri, la seksalloga prezentado ne ekscitis mian impulson; tiam mi absorbiĝis en aprezo de iliaj movadoj kaj la pilkaj trajektorioj, verŝajne vidis miajn proprajn ombrojn antaŭajn.

Plurajn tagojn poste, la patrino grizharara kaj mi sidis kviete sur la lerneja ĉefvojo, kiam

proksimiĝis al ni olda amiko, mia pasinta kolego. Salutinte al ni, li komplete veis ke se nur mi havus edzinon, tiel mia patrino grandaĝa ne bezonus pene flegi min. Mi kapjesis, murmurante plene de vortoj “sed”, “tamen”, “domaĝe” ktp. Subite li ŝanĝis la topikon kaj kun rideto flustris al mi: “Via vergo povus erektiĝi?” Mi respondis kun amara rido: “Mi ne sciis.”

La du demandoj pri seksaj reakcio kaj kapablo pensigis min profunde. Sendube oni zorgis pri mia seksa funkcio. Prave, sen amoro, sen amo kaj sekve geedziĝo sen signifo. Tiel nomata amo platona estas absurba afero. Tute nekredeble, ke en la norda parto de Ĉinio troviĝas svatejo por neamoraj homoj.

Ĉu mi kapablus ĉi-flanke? Pri tio dubis ne nur amikoj kaj parencoj sed ankaŭ ĵurnalistoj kaj specialistoj. Juna ĵurnalistino min vizitis kaj intervjuis min dum du tagoj ĉefe pri la problemo de kriplula geedzeco. Ŝi raportis pri mi en gazeto, konsultinte esplorantojn kaj specialistojn. Jen la citita peco:

Ĉe interparolado de la ĵurnalistino kaj Anteo, kiam ŝi demandis lin pri tio kiel li pensas pri siaj amo kaj geedzeco, li respondis: “Neimageble.” La ĵurnalistino sekve diris: “Ĉu vi akceptus ŝin se volus eniri vian vivon iu kiu amas vin kaj kiun vi amas?” Li ankoraŭ pale ridis kaj diris: “Neimageble. Tio ne eblas.” Lia rideto sentigis ian izolan vundodoloron. Liaj respondoj havis iom da eskapa signifo, ŝajnis neveraj. Efektive, kiam la ĵurnalistino eninterrete legis lian biografian romanon kun kelkcent mil vortoj nomatan Kunpremo de la sorta gorĝo, ŝi trovis frazojn pri Amy profunde kortuŝaj.

“koro la ne kovrata  
sin rulis glacipilke  
per palo kaj rideto  
kun adstringa gusto post  
via ektoplasmato.  
senvoĉa saluto kvazaŭ vintra tondro.  
am-aro skuiĝas.  
per paralizigaj fingroj  
kiel vian veston kapti?  
amy sukuba,  
portu for la ombron el memoro.”  
Kvankam li insiste rifuzis sinceran pro-

fundan senton, nur povis en memoro sopiri la domaĝindan tempon kiun Amy favore donis, tamen Anteo esprimis legeble en vortoj la kontraŭdiran korstaton pri atentema persisto al sento kaj samtempe pri racio kaj aspiro al amo en la kruela sorto. La homo estas kombinaĵo de kontraŭdiro, sed tiu ĉi kontraŭdiro montriĝis plej intense ĉe Anteo.

Kune zorgu pri Anteo Zhou (Estro de la Departemento de Edukado kaj Dungiteco de Hunan-a Handikapula Ligo, entreprenis la porhandikapulan karieron dum kelkdek jaroj):

En nia lando troviĝas pli ol sesdek kvin milionoj da handikapuloj; en Hunan-provinco pli ol tri milionoj, el kiuj 53.9 procentoj solvis sian geedzegan problemon. Kompare kun tiu por la normaluloj, en la leĝo de handikapula protektado estas pria rimedo favora al geedzeco de la handikapuloj: se kamparano geedziĝas kun urbano, la kamparano censiĝas kiel urbano (la geedzeco baziĝas sur amo de unu al la alia); se ili divorcas, la urbaneco de la kamparano ne validas. El ili troviĝas apartuloj kiuj havas funkciajn per-turbon kiu igas edzon aŭ edzinon ne povi plenumi sian propran devon. En tia kazo, ni lasas ilin laŭnaturaj – al ili en geedzeco ni faras nenion. Ĉe Anteo, mi tre komprenas lian kontraŭdiran psikon. Li rifuzas amon kaj geedzecon fakte pro du kialoj: la unua, premoj el la socia kaj familia konceptoj; la dua, premo el si mem – prefere rifuzi anstataŭ eventuale esti rifuzota aŭ esti forlasota. En sento li sin malliberigas tro. Se iu knabino vere komprenas lin kiu oferfaras al la socio, trovas lian indon, persistas sian kredon kaj neniam rezignas, ilia vivo devos esti feliĉa, mi pensas.

Zhang (Profesoro ĉe la Leĝa Kolegio de Hunan-a Normala Universitato):

Natura apetenco estas ia fakto de la viva ekzisto. Se Anteo kun Amy geedziĝus, Anteo senigus al Amy la rajton volupti, kio estos fakto. Se Amy nur ĉasus aĵon spiritan, pli favorus animan

**- Natura apetenco estas ia fakto de la viva ekzisto. Se Anteo kun Amy geedziĝus, Anteo senigus al Amy la rajton volupti, kio estos fakto - -**

kuniĝon kaj edzigus lin, kaj tio estus granda sindono de Amy.W (Ĉefflegistino en hospitalo en la urbo Changsha):

En la problemo de la handikapula geedzeco, la paro ambaŭ devu esti racia. Mi pensas ke Anteo tre bone agas traktante la aferon sed Amy pensis tro simple. Sento estas akvokirlo; eniro en ĝin kaj eliro el ĝi estas tute diferencaj. Ni povus alvoki partajn personojn en la socio por fondi klubon de handikapuloj aŭ socialemo organizon de mem-savado, tiel handikapuloj interkontaktiĝas kaj interŝanĝiĝas por forigi izolitecon.

Wang (Urbano):

Mi kuraĝigas Anteon brave brakumi amon. Nun ke troviĝas amo, kial ne kunvivi? Kripluloj ankaŭ bezonas aliseksan amon, devas do brave ĉasi amon. Kiam ili geedziĝos, finfine estos intimaj rilatoj, kaj tiuj rilatoj povos fariĝi parencaj.

Postparolo: Anteo penas esti fortulo de la vivo, sed malforta estas li en amo. Ni sentabue malkaŝis liajn enkoran doloron kaj rezignacion antaŭ la publiko, nur por alvoki socian zorgon al la handikapuloj, rezultigi priatenton kaj pensadon, plibonigi la sistemon de socialemo sekureco. Necesas al la speciala grupo oferado de pli da spaco por vivo kaj evoluado, por ke ilia vivo ne plu bedaŭru pro manko de amo.

Jes ja, mi rifuzas amon kaj geedzecon fakte pro du kialoj: la unua, premoj el la socia kaj familia konceptoj; la dua, premo el mi mem – prefere rifuzi anstataŭ eventuale esti rifuzota aŭ esti forlasota. Fakte, mi ne rifuzas sed nur racie forlasas. Se mi ne kapablas en amoro, mi nepre forlasas amon, por ke ne suferigu aliulon. Forlaso estas virto, kaj forlaso de amoro estas konduto respondecema.

Aliflanke, se iu perdis sin en mian akvokirlon, ekzemple iu vilaĝanino, ni havus komunan lingvon, ĉu? Pro kio ŝi amas min? Kion mi povus akiri de ŝi? Nuntempe, fortikaj geedzroj multe divorcas, por ne paroli pri mi kun malfortaj manoj. Ol certe imageblan rezulton fiaskan mi preferas nekomencon. Bona amiko ŝerce konsilis al mi ke mi povas edzinigi virinon por ke ŝi flegu min tage kaj kuŝu kun li nokte. Se vere, kian guston mi havus?

## 2. Instinkto nepereigebla

Iu mezaĝa virino, kies edzo mortis pro kancero antaŭ jaroj, veis al mi ke se nur ŝia edzo vivus kiel mi, almenaŭ ili nokte povus interparoli. Geedzroj en la juneco estas geakompanantoj en la maljuneco, tion diris virino kiu, 10 jarojn pli juna ol mi, sendis leterojn al mi kaj verŝajne volis kunvivi kun mi, fiaskinte en la unua geedzeco. Ĉu vere troviĝus tiaj virinoj, kiuj nur deziras vivantan buŝon sed ne nepre fortikan virecon? Por kleruloj necesas movi sian buŝon sed ne siajn manojn, se tiel sufiĉus, mi kapablus. Tamen mi timis.

Loĝante en hospitalo en la ĉefurbo Changsha, mi konatiĝis kun samĉambrano kiu ankaŭ estis paralizulo kaj kiun flegis lia patrino. Iun tagon, lia juna bela edzino venis de la vilaĝo viziti lin. Sidinte nelongan tempon, ŝi elprenis kajeron el la kunportita korbo kun bongustaj manĝaĵoj kaj raportis al li la hejmajn en- kaj elspezojn, konsolis lin trankvile akcepti kuracadon sed ne zorgi pri mono. Pri tio la edzo verŝajne ne zorgis. Li malpeze tiris ŝian vestangulon kaj sugestis ke ŝi sidiĝu pliproksime al li. La edzino komprenis kion li volas fari. Ŝi tanĝigis siajn koksojn al li. Li ŝin karesis je la talio kaj gluteoj ĉe rigardo de ni ĉiuj. Kaj ŝi ridetis, kisis lian frunton. Kompreneblaj estis iliaj agoj. Plenumi la instinkan deziron antaŭ ĉio montras homecon. Mono, famo, eĉ malsato, soifo kaj aliaj deziroj lasas siajn lokojn al la instinkta en ĉiuj cirkonstancoj. Por foraj kamparanoj mono estas iam pli grava ol vivo. Sed li preferis antaŭ ĉio solvi la instinktan problemon ol vivan rimedon, kio diferencigas la homon de bestoj – bestoj sendube unue manĝas kiam ĝi vidis ovojn kaj viandon kuiritan en la korbo. Tiam mi pensis ke nur se mi havus tian edzinon, ke kiam mi sentas min izolita, mi povus karesi ŝin, kisi ŝin kaj eĉ...Ĉi-nokte kion ili faris en la amasloĝejo mi tute ne sciis kvankam fruvespere ili duope sidis en la lito. En profunda dormo mi sonĝis. En la sonĝo estis sceno de porka geiĝo. La scenon mi trafis kiam mi estis en la unua jaro de la supera mezlernejo: Survoje al la bazo agrikulturstuda, ni preteriris korton de kamparano, vidinte ke homoj igis porkparon geiĝi, do haltis por gapi al la mira afero ke virporko enpikis la penison al la ina. La gvidanta instruisto tuj pelis